*nordfrancia esperanto-federacio*

# jarraporto 2008

**Membraro.** — En 2008 la Nordfrancia Federacio enkalkulis, unuflanke, **5 asociojn-membrojn** (Arras, Boulogne-sur-Mer, Dunkerque, Lille kaj Valenciennes), t.e. same kiom en 2004–2007, kaj, aliflanke, **124 fizikajn membrojn** (147 en 2007) : 28 el Arras, 4 el Boulogne, 26 el Dunkerque, 33 el Lille, 22 el Valenciennes kaj 11 izoluloj. Sed plu estas malekvilibro inter la du regionoj Nord-Pas-de-Calais (ĉ. 90 % de la membraro) kaj Picardie (ĉ. 4 %).

**Administro.** — La **Federacia Komitato** kunsidis la 20an de aprilo 2008 en Lille (Nord).

La **federacia jarkunveno** eksterordinare okazis la 9an de novembro 2008 en la Eŭropa Rendevuo de Morbecque por kune festi la centjariĝon de la Federacio kaj la 20an jaron de la Rendevuo *(vd. ĉi-sube)*.

La Federacio partoprenis la kvaran **Interfederacian Konferencon**, kiu kunigis responsulojn de la regionaj federacioj en la landa kongreso en Martigues, kaj la intertempajn kunsidojn en Parizo.

**Komunikado kaj propagando.** — La federacia trimonata revuo ***Norda Gazeto*** centjariĝis en 2008. Bedaŭrinde, komence de la jaro forpasis Lucien Bourgois, prezidinto kaj ĉefredaktoro de la revuo. Sekvis jaro kun problemo redakti kaj eldoni la *Nordan Gazeton*. Fine de la jaro stariĝis duo por ĉefzorgi la revuon kun la cetero de la redakcio : Katja Boen kaj Jean-Marc Fratard.

La Federacio luas la retregionon « esperanto-nord.org » por sia dulingva, informriĉa **federacia retejo** (*www.esperanto-nord.org*) kaj por retpoŝtaj adresoj de siaj servoj, asocioj-membroj kaj fizikaj membroj. En la retejo pliriĉiĝis la esperantlingva versio, kiu baldaŭ enhavos ankaŭ turisman rubrikon.

La Federacio disponigas siajn asociojn-membrojn pri la tri budaj kakemonoj de UFE kaj aliaj komunikiloj eldonitaj de UFE kaj JEFO, listigitaj en la Esperanta versio de la retejo.

La diversaj kluboj partoprenis en multaj **neesperantistaj aranĝoj** : forumoj de la asocioj aŭ de la lingvoj, ekspozicioj, ktp. Ili organizis ankaŭ prelegojn en publikaj salonoj, en neesperantistaj asocioj kaj en lernejoj.

**Instruado kaj ekzamenoj.** — La diversaj kluboj organizis regulajn **dumjarajn kursojn** kaj inicajn staĝojn en klubejoj, lernejoj kaj universitatoj, kiuj kunigis centon da gelernantoj.

Konforme al ĝia plurjara ekzamena politiko, la Federacio organizis **regionan ekzamensesion** en Lille (Nord) dum tuta dimanĉo la 22a de Junio 2008 : ĝi enkalkulis la unuajn tri gradojn, kaj akceptis 15 kandidatojn (unu el ili samtage trapasis la unuajn du gradojn) — sukcesis ĉiuj el ili. Ekde 2005 la Federacio organizas la ekzamenojn laŭ nova, kontentiga sistemo interkonsentita kun FEI : la Federacio mem ricevas de FEI ĉiujn rezultojn kaj diplomojn, kaj tiel povas tuj statistiki kaj plusendi la rezultojn al ĉiu ekzamenito kun gratulletero. Plie, la Federacio pagas mem la ekzamenkotizojn de la kandidatoj-federacianoj.

**Kulturo kaj aranĝoj.** — De la 7a ĝis la 9a de novembro 2008 (eksterordinare dum tri tagoj) okazis la 20a **Eŭropa Rendevuo de Morbecque**, kiu akceptis centon da partoprenantoj el Francio, Belgio, Britio… Tie disvolviĝis kvingradaj staĝoj, prelego de la francoj Arlette kaj Edmond Plutniak, prelego kaj koncerto de la ruso Mickaël Bronstein kaj magia spektaklo de la germano Trixini. Tre sukcesa estis tiu 20a Rendevuo.

La kluboj havas oftajn kontaktojn kaj renkontojn kun la belgaj kluboj de Kortrijk, Solre-sur-Sambre, Charleroi, k.a. Ili akceptis plurajn **eksterlandajn esperantistojn**, kaj plurfoje tiuokaze organizis publikajn prelegojn.

Fine, multaj federacianoj partoprenis esperantistajn kongresojn, renkontiĝojn aŭ staĝojn (francajn kaj eksterlandajn).

**Venontaj projektoj.** — La Federacio celas daŭrigi siajn ĉi-supre diritajn politikojn pri varbado, komunikado, instruado, ekzamenoj, kulturo, kunlaboro kun UFE…

*Raportis : Xavier Dewidehem,*
*prezidanto de la Nordfrancia Esperanto-Federacio*